

Kial la diskriminacio en Niĝerio?

31a jarkolekto - marto 2010/03

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

**Fluge tra  
la flughaveno**

**Kolero en la aero**

**Litovio: adiaŭ  
al la nuklea ŝtato**

**Hobio:  
nestokestoj**



s honestaj kaj ka-  
plej fortaj gar-  
Pro tio ili estas  
ataj homoj sur nia  
aroj ne povas to-

Germanio inter la  
ĵurnalisto devis  
, sed tute aparte  
e Hitler.

a degeneriĝo Kurt  
elokventan voĉon  
fuzis fuĝi, ĉar li  
vas agi kvazaŭ ĉio

Trevor Steele  
Kvazaŭ ĉio  
dependus de mi

Trevor Steele

## Kvazaŭ ĉio dependus de mi

“Aŭtoro je vere monda nivelo”

Gerrit Berveling

Trevor Steele

### Kvazaŭ ĉio dependus de mi



FEL



Ĵurnalistoj, se ili estas honestaj kaj kapablaj, estas inter la plej fortaj gardantoj de demokratio. Pro tio ili estas inter la plej endanĝerigataj homoj sur nia planedo: koruptaj registaroj ne povas toleri oponantojn.

En la tumulto epoko de Germanio inter la du mondmilitoj sentima ĵurnalisto devis oponi ĉiujn ŝovinistojn, sed tute aparte la leviĝantan movadon de Hitler.

En tiu tempo de morala degeneriĝo Kurt Lenz kuraĝis levi sian elokventan voĉon kontraŭ barbareco kaj rifuzis fuĝi, ĉar li kredis, ke ĉiu el ni devas agi *kvazaŭ ĉio dependus de mi*.

Serio Stafeto n-ro 34  
Eldonjaro: 2009

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 380 g,  
344 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-41-6;  
prezo ĉe FEL: 19,20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (EPUB aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 11,50 EUR

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [rebutiko@fel.esperanto.be](mailto:rebutiko@fel.esperanto.be)

## Kial la diskriminacio?

9

La 25an de decembro 2009 niĝeriano provis eksplo- digi usonan aviadilon kun preskaŭ 300 pasaĝeroj. Unue, en Niĝerio oni taksis la raporton erara kaj ridinda. Sed kiam montriĝis, ke temas ja pri 23-jaraĝa niĝeriano, ne nur ŝokiĝis, sed ankaŭ ekkoleris la tuta lando. Se oni estus kap- tinta la junulon, li estus dispecigita.

## Fluge tra la flughaveno

10


Dum la lastaj jaroj la Inter- nacia Asocio pri Aertransporto (IATA) laboras por plirapidigi la administradon de flugvojaĝoj. Tion ebligas la fulma disvolviĝo de elektronikaj rimedoj, necesaj por kontraŭpezi la atendotem- pon antaŭ la sekurecokontrolo en la flughavenoj.



## Adiaŭ al la nuklea ŝtato


12

Kun la alveno de la nova jaro Lito- vio perdis unu el siaj mondaj Guinness- rekordoj: ĝi ne plu estas la lando kun la plej potencaj atomreaktoroj. Unu horon antaŭ la alveno de la jaro 2010 Litovio fariĝis la unua en la mondo, kiu rezignis pri nuklea energio.



## Senpaga transporto danke al loĝantarkonsciigo

17



Kelkaj el niaj legantoj eble konas „Asterix”, francan bildstiron, kiu rakontas la reziston de gaŭla vilaĝeto kontraŭ la romia imperio. En Provenco, sudfranca kaj suna regiono, oni havas nek Obelix (heroon de la bildstrio) nek magian pocion por konstruistari, sed oni havas alian virton: espero kaj obstino kune preni sian sorton en siajn manojn.

### politiko

|                        |   |
|------------------------|---|
| <b>JAPANIO</b> .....   | 8 |
| Retaksante la buĝeton  |   |
| <b>TERORISMO</b> ..... | 9 |
| Kial la diskriminacio? |   |
| <b>ALBANIO</b> .....   | 9 |
| Inundo da kritiko      |   |

### moderna vivo

|                         |    |
|-------------------------|----|
| <b>AVIADO</b> .....     | 10 |
| Fluge tra la flughaveno |    |
| <b>AVIADO</b> .....     | 11 |
| Kolero en la aero       |    |
| <b>LITOVIO</b> .....    | 11 |
| Reĝa „mann”-ifesto      |    |
| <b>SPORTO</b> .....     | 11 |
| Reala ĝeno              |    |

### ekonomio

|                          |    |
|--------------------------|----|
| <b>LITOVIO</b> .....     | 12 |
| Adiaŭ al la nuklea ŝtato |    |

### hobio

|                        |    |
|------------------------|----|
| <b>FINNLANDO</b> ..... | 14 |
| Nestokestoj            |    |

### turismo

|                     |    |
|---------------------|----|
| <b>BELGIO</b> ..... | 16 |
| Bunkro remalkovrita |    |

### medio

|                                               |    |
|-----------------------------------------------|----|
| <b>SUDA FRANCIO</b> .....                     | 18 |
| Senpaga transporto danke al loĝantarkonsciigo |    |

### novelo

|                                      |    |
|--------------------------------------|----|
| <b>ANALOJ DE BAILENAMBEANN</b> ..... | 20 |
| Tajg kaj Tomas                       |    |

### libroj

|                                          |    |
|------------------------------------------|----|
| Pri Pupteatra Internacia Festivalo ..... | 24 |
|------------------------------------------|----|

### enigmoj

|                    |    |
|--------------------|----|
| Bilda enigmo ..... | 25 |
|--------------------|----|

|                          |    |
|--------------------------|----|
| › Abonoj .....           | 4  |
| › Enkonduko .....        | 5  |
| › Leteroj .....          | 6  |
| › El mia vidpunkto ..... | 7  |
| › Anoncetoj .....        | 27 |

## ► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## ► Tarifoj

| Ŝtato de la paganto |     | MONATO  |      |       | LA JARO aere |          |
|---------------------|-----|---------|------|-------|--------------|----------|
|                     |     | surface | aere | rete  | 3a klaso     | 1a klaso |
| Argentino           | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Aŭstralio           | AUD | 87      | 92   | 52,2  | 9,5          | 15       |
| Aŭstrio             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Belgio              | EUR | 49      | 58   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Brazilo             | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Britio              | GBP | 44      | 47   | 26,4  | 5            | 7        |
| Bulgario            | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Ĉeĥio               | EUR | 35      | 38   | 21    | 5,5          | 9        |
| Danio               | DKK | 366     | 396  | 219,6 | 41           | 65       |
| Estonio             | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Finnlando           | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Francio             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Germanio (ok.)      | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Germanio (or.)      | EUR | 47      | 51   | 28,2  | 5,5          | 9        |
| Grekio              | EUR | 47      | 51   | 28,2  | 5,5          | 9        |
| Hispanio            | EUR | 47      | 51   | 28,2  | 5,5          | 9        |
| Hungario            | HUF | 7400    | 8200 | 4440  | 1500         | 2410     |
| Irlando             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Islando             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Israelo             | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Italio              | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Japanio             | JPY | 7980    | 8500 | 4788  | 860          | 1200     |
| Kanado              | CAD | 78      | 84   | 46,8  | 9            | 14       |
| Kipro               | EUR | 35      | 38   | 21    | 5,5          | 9        |
| Koreio              | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Kostariko           | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Kroatio             | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Latvio              | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Litovio             | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Luksemburgo         | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Malto               | EUR | 35      | 38   | 21    | 5,5          | 9        |
| Nederlando          | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Norvegio            | NOK | 430     | 460  | 258   | 48           | 71       |
| Nov-Zelando         | NZD | 105     | 111  | 63    | 11,5         | 18       |
| Pollando            | PLZ | 115     | 126  | 69    | 23           | 36       |
| Portugalia          | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Rusio               | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Serbio              | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Slovakio            | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Slovenio            | EUR | 35      | 38   | 21    | 5,5          | 9        |
| Sud-Afriko          | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Svedio              | SEK | 499     | 543  | 299,4 | 56           | 84       |
| Svislando           | CHF | 82      | 88   | 49,2  | 9            | 14       |
| Usono               | USD | 78      | 82   | 46,8  | 8            | 13       |
| Baza tarifo         | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |

## ► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albue-  
ra Street, Battery Poooint Tas 7004, Australia.  
Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,  
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.  
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei  
140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).  
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,  
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.  
Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio  
de Britio, Esperanto House, Station Road,  
Barlston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE,  
Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,  
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto  
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,  
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.  
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper,  
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-  
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45  
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-  
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de  
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530  
Helsinki, Finnlando.  
Reto: eafoicejo@esperanto.fi
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,  
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D  
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**  
> Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer  
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:  
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)  
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
- > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303  
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk  
91856-676 (BLZ 54510067)).  
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang  
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129  
Mainz.  
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,  
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de  
Pensions 2100-0461-90-0200055053).  
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,  
Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9  
Templeogue Wood, Dublin 12.  
Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,  
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.  
Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via  
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:  
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,  
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.  
esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a  
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,  
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro  
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860  
Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,  
1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti  
Duh 130, HR-10000 Zagreb.  
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Latvia:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas  
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371  
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,  
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.  
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394  
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111  
0089 3612 0000).  
Reto: esper\_lu@geocities.com.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg  
176, NL-3015 BJ Rotterdam.  
Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf  
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.  
Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date  
Crescent, Christchurch 8025.  
Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117  
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-  
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV  
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,  
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239  
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**  
> Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-  
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.  
Reto: sezonoj@gazinter.net.
- > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006  
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.  
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:  
42301.810.3.0018.0084867.  
Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića  
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.  
+381-63-7200 616. Reto: zcirić@eunet.yu
- > **Slovenaj kaj Slovakaj:**  
> Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129  
Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,  
HR-10000 Zagreb.  
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview  
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.  
Reto: checkford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**  
> Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-  
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123  
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.  
esperanto@telia.com.
- > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet  
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35  
Hörby, Svedio.  
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn  
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7  
Basel. Reto: ch\_scheidegger@bluewin.ch.
- > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,  
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1  
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

# Kiam venos la ŝanĝo?

**E**n la januara numero de 2009 mi komentis ĉi-loke la elektojn de Barack Obama kiel usona prezidanto (*Aĉetita mesio*) kaj iom malpli entuziasme, ol multaj aliaj, bonvenigis lin. Atentigante pri la karismo, kiun li sendube havas, mi skribis: „Prave do oni ligas multajn esperojn kun la nova prezidanto. Sed ni estos jam kontentaj, se li estos normala registaro, tiel normala, kiel fakte estis la elektorezulto.” Nun, unu jaron poste, ni vidas, ke efektive li estas tute ordinara usona prezidanto kaj ne tia mesio, kian kredigis al ni la „Obamamania”, kies viktimo iĝis eĉ la Nobelkomitato, kiu atribuis al li la monde plej prestiĝan pacpremion, kvankam li tiutempe povis imponi nur per grandiozaj paroladoj, sed neniuj gravaj faroj.

La sola granda faro ĝis nun estis, ke li relative bone majstris la finankkrizon – sed je kia prezo! En la nova

usona buĝeto li antaŭvidas rekordan ŝuldosumon de entute 3,8 miliardoj da dolaroj. Nu, ankaŭ tio estas ne elstara, sed ordinara faro, ĉar simile agas aliaj landoj. Ekzemple, ankaŭ Germanio relative bone superis la krizon kaj same ŝarĝas sian buĝeton per rekorda ŝuldo. Kio estas pri la promesoj de Obama? Li volis fermi la kontraŭleĝan teroristokarceron en Guantánamo, sed nun montriĝas, ke tio ne estas facile realigebla; do ĝi restas ĝis iam ajn. Li volis disponigi al ĉiu usonano sanasekuron, sed la grandioza vizio fariĝis reformeto, pri kies sorto oni ne riskas prognozi ion ajn. Li volis pacigi Proksiman Orienton kun Israelo kaj Palestino. Nenian progreson oni povas konstati. Li strebis al repaciĝo kun Irano, sed nun establos raketojn en najbaraj ŝtatoj kontraŭ Irano. Kaj laste, sed ne malgrave: li volis funde ŝanĝi la klimapolitikon de Usono, sed dum la pinta konferenco en Kopenhago anoncis


neniun konkretan planon por savi nin de la katastrofo minacanta la tutan terglobon.

La reputacio de Obama draste falis, precipe en Usono mem, kie laŭ opinisondoj malplimulto intertempe respektas lin kaj lian regadon. Li nun devas barakti kun la obstakloj, kiujn enhavas la politika sistemo de Usono: la onidire plej potenca viro de la mondo devas konvinki du parlamentajn ĉambrojn pri siaj ideoj, do ne simple povas realigi siajn promesojn. Ŝajnas, ke nun ne estas epoko de mesioj. Ni ne fieras, ke antaŭ unu jaro ni kvazaŭ prognozis „normalan” prezidanton. Prefere ni esperu, ke malgraŭ ĉiuj malhelpoj Obama sukcesos regadi por la bono de sia popolo kaj de la mondo. La „ŝanĝo” promesita de li eble tamen venos, iam.

Sincere via

*Stefan Maul*

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

## eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

## ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.  
Rete: chefredaktoro@monato.net.

## reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

## redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.  
Rete: redakcio@monato.net.

## grafiko:

Ferriol Macip i Bonet.

## redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.  
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.  
Telefono 440-646-1482.  
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.  
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.  
Rete: moderna\_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.  
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.  
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.  
Rete: spirita\_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco\_kaj\_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.  
Rete: turismo@monato.net.



## Mi vivas surstrate ...

Christine Théano estas unu el la multaj, kiuj perdis familianojn kaj sian tutan havaĵon en Haitio. La muroj de ŝia domo kolapsis kaj ŝi vivas surstrate. Ŝi skribis: „Ni havas akvon, sed ricevi alian helpon ne estas facile, ĉar estas multe da personoj kaj foje ili batas unu la alian por havi nutraĵojn. Mi ne havas rekte adreson por ricevi vestaĵojn kaj manĝaĵojn, ĉar la familia domo, kie mi vivis, tute falis.” Christine volas rekonstrui sian domon en la venontaj monatoj.

Simila estas la situacio ĉe la aliaj Esperanto-parolantoj en Portoprinco. La plimulto postviviskaj provas reorganizi sian vivon, komenci denove, ekde nulo.

Se vi volas helpi al Christine kaj al ŝia Esperanto-amikaro, pagu iun ajn sumon al unu el la kontoj de Flandra Esperanto-Ligo (vidu p. 4) kun la mencio “Haitio”. Tre koran dankon ilianome!



*Christine Théano estas unu el la multaj, kiuj perdis familianojn kaj sian tutan havaĵon en Haitio.*

## Ĉu satanisto povas administri ekleziojn?

Iom harsplitaj kaj nekonsekvencaj estas la konkludoj de la artikolo *Ĉu satanisto povas administri ekleziojn?* en MONATO 2010/1, paĝoj 7-8. Sendepende de la reala satanismo de la nova direktoro (sinjoro Gulič) de la slovena oficejo pri religioj-eklezioj, estas dirite, ke persono estas satanisto „ne nur per tio, ke li demonstras ĉemize aŭ per formala aparteno al iu komunumo, kultanta Satanon, sed jam per tio, ke li ne estas novnaskita kristano laŭ la normoj, starigitaj de Jesuo Kristo”. Laŭ kristanismo tio veras, sed kiun kriterion posedas Vinko Ošlak por konstati, ĉu tiu novnaskiĝo okazis aŭ okazas?

Tiu novnaskiĝo estas io kredata kaj nevidebla; do kiu volas taksu, tiu devas limiĝi je tio, kio aperas ekstere (eble el ĉemizo!), kun la risko, certe, fari eraron. Se tiel, sekve fariĝas iom stranga la aŭtora aserto, ke „apartenus al la sama kategorio” eventuala katolika direktoro de la sama oficejo: ĉu ankaŭ por penetri liajn nevideblaĵojn la aŭtoro posedas apartan – superhoman – kriterion?

Armando ZECCHIN  
Italio

## Problemo nesolvebla

Antaŭ nelonge mortigis teroristoj kelkdek da senkulpaj homoj en Pakistano. Aliaj atencoj tiaj okazas en aliaj mondopartoj. Sed kio naskas teroristojn?

Tiun demandon neniu povas respondi, tamen la nombro de teroristoj kreskas. Registaroj, kun siaj armeoj, asignas multe da mono al batalo kontraŭterorisma, sed ankoraŭ ne solvis la problemon. Dume la teroristoj minacas ĉiujn, malgraŭ tio ke plejparte homoj deziras pace kaj sekure vivi.

Neniu estas denaska teroristo. Kial ili fariĝas teroristoj? Kial teroristoj, kiuj ne nur senkulpulojn, sed ankaŭ sin mem mortigas, tiel traktas la vivon? Ofte ili agas por mistera celo malfacile komprenebla al ordinaraj homoj. Jen situacio ne nur terura, sed ankaŭ bedaŭrinda.

Xu Jinming/pg  
Ĉinio

## Pinta eraro

En la januara numeron de MONATO enŝteliĝis malagrabla eraro. En la kontribuaĵo *Pinta virino* sur paĝo 10, en la resumo sur paĝo 3 kaj sur la kovrilpaĝo supre (*Irina Bukova: pinta virino*) aperas erare skribite la familia nomo de nova ĝenerala sekretario de Unesko. Ŝi nomiĝas ne Bukova, sed Bokova.

Evgeni GEORGIEV  
Aŭstrio

## Fota eraro

La supra foto sur paĝo 15 de la januara numero de MONATO laŭ mi montras ne la kastelon Lichtenstein, sed la pli faman kaj pli grandan kastelon Neuschwanstein. Kio ligas ambaŭ kastelojn kaj ankaŭ provokas eraron, estas la ja iom simila aspekto, ĉar ambaŭ kasteloj estas fantaziaj imagoj pri romantika mezepoka kastelo kaj estis pli-malpli samepoke (meze de la 19a jarcento) konstruitaj. Por kompari jen la vera kastelo Lichtenstein: [www.schloss-lichtenstein.de](http://www.schloss-lichtenstein.de).

Helmut KLÜNDER  
Germanio



La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado.

Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al [leteroj@monato.net](mailto:leteroj@monato.net) aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

# Homaro ofendata

Stefan MAUL

**L**astatempe okazis du gravaj grandaj konferencoj pri gravaj kaj grandaj problemoj de la mondo. Meze de novembro 2009 en Romo kunvenis 60 registaraj ĉefoj por pinta konferenco de Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo (ONA) de Unuiĝintaj Nacioj. Temo: batalo kontraŭ la katastrofe kreskanta malsato en la mondo. Poste, fine de decembro, kunvenis eĉ 120 ĉefregistoj en klimatkonferenco en Kopenhago. Temo: batalo kontraŭ la katastrofe kreskanta varmiĝo de la tero. Ambaŭ konferencoj faris nenion alian ol terure ofendi la homaron.

## Miliardo malsatas

La du temoj interdependas, ĉar inter la faktoroj, kiuj kontribuas al kreskado de malsato, estas ankaŭ la klimat-ŝanĝo. Laŭ ONA unu miliardo da homoj malsatas, unu sesono de la homaro. La ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj Ban Ki Moon atentigis, ke dum la tago de la konferenco mortas 17 000 infanoj pro malsato, sed

tiu nombro evidente tute ne impresis la ŝtatestrojn okcidentajn. ONA postulis, ke en la konferenca deklaro oni devus fiksi la celon, ĝis 2025 elimini malsaton. La ŝtatestroj ja konfirmis sian volon, kontraŭbatali malsaton, sed konkretajn paŝojn ili ne decidis. Sur ok paĝoj ili nur listigis plurajn jam faritajn promesojn, inter ili tiun de la Grandaj 8 (landoj) de somero 2009, disponigi dum la venontaj tri jaroj 20 miliardojn da dolaroj por evolulandoj. En Romo la riĉaj ŝtatoj disponigis eĉ ne unu centon pli. Do estis superflua konferenco, kiu finiĝis per kompleta fiasko.

## Nur paroladoj

Eĉ pli mizera estis la (mis)rezulto de la konferenco en Kopenhago. Neniam antaŭe kunvenis tiom da ŝtatestroj por solvi unuopan problemon; do povus fariĝi historia konferenco. Ke venis tiom multaj, montris la urĝecon kaj gravecon de la klimatokrizo, montris, kiom granda intertempe estas la publikaj premoj de la socioj en multaj landoj. Multaj registoj ja diris en gran-

diozaj paroladoj, ke oni devus limigi la varmiĝon je 2 celsiaj gradoj, sed konkretajn decidojn por atingi tiun celon ili ne faris. La 193 ŝtatoj eĉ ne akceptis la fine formulitan dokumenton – ili nur „registris“ ĝin. Tial ĝi tute ne estas deviga laŭ internacia juro. Ĉu imageblas pli evidenta fiasko?

Kion konkludi el ĉi ĉio? Ke komplete mankas kapablo kaj volo de la monda socio solvi tutmondajn problemojn. Tamen ja la financ-krizon oni superis pli-malpli bone kaj rapide. Tiukampe estis la fundaj kaj propraj interesoj de la kapitalistaj landoj, savi siajn ekonomiojn. Do ili (re)agadis forte kaj konsekvence. Sed koncerne la tutmondajn problemojn de malsato, klimato, akvomanko kaj regionaj konfliktoj, por listigi nur kelkajn, la situacio estas alia, vere deprima. Ni havas nenian tutmondan institucion por solvi tutmondan problemon, ankaŭ ĉar UN estas tro malkohera kaj malforta. Mankas la sento pri tutmonda justeco, kiu povus konduki al tutmonda interkonsento por aliri la problemojn.

## Falsa mezurilo

Ankoraŭ ĉie oni adoras ekonomian progreson kaj konsumadon. Ŝtatoj fieras pri sia malneta enlanda produkto (MEP), sed kiel mezurilo por vera progreso ĝi estas falsa. Memoru ekzemple, ke kostoj por forigi la sekvojn de la uragano „Katrina“ per miliardoj da dolaroj kontribuis al la usona MEP. Pro ĉiu mortinto de trafikakcidento kreskas la MEP, ĉar ni devas pagi por polico, ambulanco, hospitalo, medikamentoj, advokatoj, funebro ktp. Ĉu ne estas absurde, tiel kalkuli progreson? Necesus komplete ŝanĝi nian sistemon, ne kreskigi, sed redukti la ekonomian kreskon favore al solvo de la tutmondaj problemoj per la ŝparita mono. Se ni ne faras tion, ni pekas kontraŭ la postaj generacioj. La nepoj nin malbenos! ■



*Eĉ pli mizera estis la (mis)rezulto de la konferenco en Kopenhago.*

# Retaksante la buĝeton

**F**iniĝis retaksado de projektoj proponitaj de japanaj ministrejoj. La retaksado sekvas promeson de la nova registaro malkaŝi al japanoj la misuzon de la ŝtata buĝeto sub la antaŭa administrado.

Laŭ la retaksado de entute 447 projektoj, 71 estos nuligitaj kaj 19 provizore haltigitaj. Tiel la registaro ŝparos 1600 miliardojn da enoj.

Publike observis la retaksado-kunvenon dum naŭ tagoj 20 000 homoj, interrete 340 000. Opiniis la respondeca ministro Sengoku: „En familiaj konversacioj kaj eĉ en la rondoj de senhejmuloj tiu kunveno estis paroltemo. Tiu granda intereso inter popolanoj signifas, ke ili jam sentis malsanon en politiko kaj administrado.”

## Kontenta

Komentis la nova ĉefministro, Hatojama Jukio de la Demokrata Partio: „La buĝeto iĝis videbla al la popolo. Mi estas kontenta pri la kunveno.”

Ĝis nun japanoj simple akceptis la buĝeton proponitan de la registaro. Aprobis ĝin la parlamento sen multe da diskutoj. Nun japanoj pli interesiĝas kaj komprenas, kiel estas uzataj impostoj. Tamen restas problemoj.

Ekzemple, la registaro celis ŝpari 3000 miliardojn da enoj, sed la ŝparota sumo ne atingis la celon. Pro tio, kiam la registaro preparos la venontjaran buĝeton, kiu enhavos novajn projektojn laŭ la manifesto de la reganta partio, mankos financoj. Ankaŭ kelkaj decidoj estas tro rapide trafataj. Malgrandigota estas la buĝeto por sciencaj esploroj: plendis sciencistoj, dirante, ke por la malgranda Japanio gravas esploroj tiaj.

## Sanktaĵoj

Krome restas sanktaĵoj. Ankoraŭ permesataj estas konstruado de aviadilŝipo, misila defendo-projekto kaj „afabla buĝeto por usonaj garnizonoj en Japanio”. Tiuj projektoj estas kontraŭ la japana konstitucio kaj laŭ la volo de Usono.

Alia sanktaĵo koncernas publikan monon por apogi politikajn partiojn (escepte de la komunistoj). Tio signifas, ke japanoj per siaj impostoj helpas partiojn, kiujn ili ne subtenas. Tio atencas la politikan rajton de la popolo.

La ĵurnalistaro estas kritikema pri ĉio, kion faras Hatojama. Tiu certe bezonas tempon por „perfekte purigi Japanion”, kiel li promesis, ĉar restas multo putra kaj polva post longa regado de la Liberala Demokratia Partio.

HORI Jasuo



Hatojama Jukio (de la Demokrata Partio) - la nova ĉefministro de Japanio.



# Kial la diskriminacio?

**L**a 25an de decembro 2009 niĝeriano provis eksplodigi usonan aviadilon kun preskaŭ 300 pasaĝeroj. Unue, en Niĝerio oni taksis la raporton erara kaj ridinda. Sed kiam montriĝis, ke temas ja pri 23-jaraĝa niĝeriano, ne nur ŝokiĝis, sed ankaŭ ekkoleris la tuta lando. Se oni estus kaptinta la junulon, li estus dispecigita.

Eble malfacilas al neniĝerianoj kompreni reagon tian. Tamen Umar Farouk Abdul Mutallab devenis el unu el la plej riĉaj familioj en Niĝerio. Lia patro, Alhaji Mutallab, estris la plej grandan kaj plej sukcesan bankon en Niĝerio. Kiam li emeritis, oni elektis lin estro de nove fondita islama banko, la unua en Niĝerio.

## Lernejo

Dum aliaj junuloj vivas en malriĉeco, kaj apenaŭ povas trovi panon, Abdul Mutallab edukiĝis eksterlande, ĉe brita lernejo en Togolando kaj poste ĉe la Universitato de Londono. Cetere li facile vojaĝis ĉien en la mondo.

Kiom el la 150 milionoj da niĝerianoj havas tiajn eblojn? Kiom el ili povas akiri vizojn por studi aŭ vojaĝi? Tio ne estas la sorto de ordinara niĝeriano, kiu ĉiutage alfrontas malriĉecon kaj senlaboron, kaj kiu manĝas rubaĵojn. Do estas fakto, ke Abdul Mutallab ne reprezentas niĝerianojn.

## Konfliktoj

Cetere, malgraŭ konfliktoj en Niĝerio, ĉefe inter kristanoj kaj islamanoj, dum kiuj mortas centoj, miloj da homoj, ĝis nun neniun niĝeriano estas enplektita en terorismo. Krome nekredeblas, ke niĝeriano tiel agas kontraŭ Usono, ĉar multaj niĝerianoj havas usonan ŝtatanecon kaj tie loĝas.

Notindas ankaŭ, ke la junulo estas trejnita de fundamentistoj ekster Niĝerio, do en Britio kaj en Jemeno, kie li akiris la rimedojn por detruigi la aviadilon.

## Ŝtato de intereso

Komence de januaro Usono listigis Niĝerion kiel tiel nomatan ŝtaton de intereso, do ŝtaton, kiu subtenas terorismen. Tio signifas, ke Usono aparte kontrolos pasaĝerojn, kiuj alvenas aviadile el Niĝerio (ankaŭ tiujn el Kubo, Sirio, Sudano kaj Norda Koreio).

Tamen kial tiamaniere puni landon pro unu homo, kiu neniel reprezentas niĝerianojn? Niĝerio estas ŝtato, kiu kunlaboras kun diversaj mondaj instancoj por haltigi terorismen. Do oni juĝu la aferon laŭ ĝia propra kunteksto kaj ne humiligu niĝerianojn, kaj ilin ne diskriminaci, pro unusola korupta kaj dorlotita knabaĉo.

Princo Henriko OGUINYE/pg  
Niĝerio

**La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.**

**Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio,**

**butiko@fel.esperanto.be  
aŭ www.retbutiko.net  
kontraŭ 9,50 eŭroj +  
afranko.**

# Inundo da kritiko

**I**nundiĝis dekmiloj da hektaroj en la nordokcidenta, malalta kamparo de Albanio, inkluzive de domoj, bienoj kaj brutaroj. Kulpis ne la vetero, sed mise administrataj akvocentraloj.


Ĉe la norda rivero Drin, en regiono alpmontara, estas konstruitaj tri grandaj akvocentraloj. Abundas akvo, ekzemple pro la neĝoj. La centraloj, kiuj produktas ĉ. 95 % de la enlanda elektro, ĉiuj posedas siajn basenojn, por teni la akvon, kun suma volumeno de 74 milionoj da kubmetroj.

## Tuneloj

Tamen, kiam troas akvo, necesas ĝin revenigi per tuneloj al la rivero. Pro tio, kaj pro neriparitaj digoj, okazis la inundoj.

Helpis la viktimojn kaj la armeo kaj eksterlandaj trupoj, ekzemple de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Tamen forte kritikis la registaron la opozicio pro neglekto de la afero.

Bardhyl SELIMI/pg



**Kontribuojn pri la politiko de via lando sendu al politiko@monato.net**

AVIADO

# Fluge tra la flughaveno

**D**um la lastaj jaroj la Internacia Asocio pri Aertransporto (IATA) laboras por plirapidigi la administradon de flugvojaĝoj. Tion ebligas la fulma disvolviĝo de elektronikaj rimedoj, necesaj por kontraŭpezi la atendo-tempon antaŭ la sekurecokontrolo en la flughavenoj.



Tial oni disvolvis t.n. Rapidvojaĝan Programon, kiu antaŭvidas ne nur tempoŝparon en kvar aspektoj de flughavenaj formalajoj, sed ankaŭ jaran monŝparon de 1,6 miliardoj da usonaj dolaroj favore al la flugindustrio. Samtempe la nova iniciato povos maldensigi la homamasojn, kiuj koncentriĝas en la akceptejaj haloj de multaj flughavenoj.

## Elementoj

La kvar elementoj de la Rapidvojaĝa Programo jenas:

1. Rapida transdono de bagaĝo. La pasaĝero uzas memservan budon por printi la bagaĝetiketojn kaj poste transdonas la bagaĝon al fluglinia akceptisto. Tio funkcias, eĉ kiam la pasaĝero jam



RGERWIN

enlistiĝis interrete aŭ poŝtefone, kaj rapidigas la enlistigon de pasaĝeroj, kiuj vojaĝas kun bagaĝo.

2. Skanado de vojaĝdokumentoj. Eblas ĉe la sama memserva budo skani pasportojn kaj aliajn identigilojn. Tiel la pasaĝeroj povas iri rekte al sekurecokontrolo, evitante sinprezenton antaŭ akceptejo. En 2009 jam en 75 lokoj aperis tiu ĉi eblo.

## Pordo

3. Mem-enaviadiliĝo. Ne necesas viciĝi por eniri la aviadilon. Aŭtomata enaviadiliĝa pordo ebligas al pasaĝero skani sian enirpermesilon. Tio rajtigas eniri la aviadilon, laŭ la sama sistemo trovebla ĉe trajno- kaj metro-stacioj.

4. Retrovo de bagaĝo. Pasaĝero informiĝas ĉe memserva budo pri mankanta bagaĝo kaj ne viciĝas ĉe bagaĝejo. Detalojn pri perditaj valizoj la pasaĝero entajpas ĉe la budo.

En 2009 ĉi tiujn eblojn proponis nur kelkaj fluglinioj en kelkaj flughavenoj. Oni antaŭvidas ĝeneralan enkondukon ĝis 2012.

Ivo SCHENKEL



SQUUSUALS

*La nova iniciato povos maldensigi la homamasojn, kiuj koncentriĝas en la akceptejaj haloj de multaj flughavenoj.*

# Kolero en la aero



ALBANIAN AIRLINES

**P**rotestis nepagataj pilotoj de la albana flugkompanio *Albanian Airlines*, flugante en januaro en aviadilo el la ĉefurbo Tirano ne al ĝia celo en Bologna, sed al Bratislavo. Ekde oktobro la slovakaj pilotoj ne estis salajrataj.

La albana ambasadoro en Vieno tuj

provis tranoktigi la 111 pasaĝerojn, kaj la albana civila aviado-organizaĵo luis aviadilon el Amsterdamo, kiu du tagojn poste venigis ilin al Bologna. Atendate estas, ke la instancoj en Bratislavo procesos kontraŭ la pilotoj.

Bardhyl SELIMI

# Reĝa „mann“-ifesto

**L**a litova ministro pri eksterlandaj aferoj ricevis strangan leteron. Sendis ĝin skoto, loĝanta en Aŭstralio, kiu deklaras sin reĝo Roman la 2a de Litovio.

La „reĝa“ retejo informas, ke la skoto fariĝis reĝo antaŭ kvin jaroj kaj en 2008 estis kronita en la aŭstralia urbo Darwin. Ŝajnas, ke la pretendanto, laŭnome Ro-

nald Victor Charles Mann, naskiĝis en 1942 en Edinburgo, Skotlando. Li heredis la tronon de sia patro, princo Roman la 1a, kiu mortis en 1967.

Verŝajne temas pri provo riĉiĝi. Mann vendas titolojn de nobeloj, kiuj eĉ neniam ekzistis en Litovio.

LAST

# Reala ĝeno

**K**iam paneis la elektro dum futbalmatĉo inter loka albana teamo kaj la multe pli prestiĝa hispana teamo Real Madrid, komentariistoj taksis la aferon skandala. La ministro pri sporto maldungis la stadionestron, ĉar la misfunkcio lezis la reputacion de Albanio en la sporta mondo.

La paneo de kvar grandaj lumjetiloj ĉe la ludejo des pli ĝenis, ĉar decidite estas donaci la enspezojn de la matĉo al viktimoj de la inundoj en nord-orienta Albanio.

Tamen multaj atentigis, ke paneoj tiaj okazas ankaŭ en pli evoluintaj landoj. Cetere post 90 minutoj refunkciis la elektro, kio ebligis ludi la duan parton. Kaj la rezulto? Du kontraŭ unu favore al la hispanoj.

Bardhyl SELIMI



MARGIO

Artikolojn pri la vivo en  
via regiono sendu al  
[moderna\\_vivo@monato.net](mailto:moderna_vivo@monato.net)

LITOVIO

# Adiaŭ al la nuklea ŝtato

Kun la alveno de la nova jaro Litovio perdis unu el siaj mondaj *Guinness*-rekordoj: ĝi ne plu estas la lando kun la plej potencaj atomreaktoroj. Unu horon antaŭ la alveno de la jaro 2010 Litovio fariĝis la unua en la mondo, kiu rezignis pri nuklea energio. Dum la lastaj kvin jaroj funkcia nur je duono de sia potenco, la centralo de Ignalina liveris ĝis 80 % de la elektroenergio bezonata de Litovio.

Je la 23a horo de la 31a de decembro de la jaro 2009 ĝi spiris la lastan spiron.

*La ĉefdirektoro de la nuklea centralo de Ignalina ĉi tie laboras dum 27 jaroj. La nuklea centralo kun la plej potencaj reaktoroj finis sian ekzistadon. En la aparatejo de Ignalina centralo nun regas silento. La laboroj en la centralo ankoraŭ daŭros dum pluraj jaroj.*

La novjarnokto por pli ol 25 000 loĝantoj de la apuda urbo Visaginas probable estis la plej trista momento en la 35-jara historio de tiu urbo en la oriento de Litovio. La bonfarto de la plimulto de la urbanoj dependis de la nuklea centralo de Ignalina. Ĉiu oka laboranto de la centralo en la 1980aj jaroj alvenis el diversaj lokoj de la tiama Sovetio kaj ĝis nun al Litovio rilatas kvazaŭ fremdulo. Post la fermo de la centralo multaj devos serĉi alian laboron aŭ komenci propran entreprenon. Hejtado kostos trioble, kaj por elektra kurento loĝantoj de la urbo devos pagi duonon de la normala prezo, dum antaŭe por tio ili elspezadis nur kelkajn cendojn.

## Politika sindevigo

Kial oni ĉesigis la funkciadon de la nuklea centralo ne dum la varma so-

mero sed en frosta sezono? „Estis nia devo plenumi la kontraktajn sindevigojn de Litovio kaj tiel konservi ĝian bonan reputacion antaŭ la internacia komunumo. Teknike ni povas elŝalti atomreaktoron iam ajn aŭ eĉ po iomete, tamen politike la malfunkciigo de la elektrocentralo estis antaŭvidita”, klarigis la 61-jaraĝa ĉefdirektoro de la centralo, Viktor Ŝevaldin, kiu antaŭ 27 jaroj el Rusio venis al Visaginas. Okaze de la akcepto de Litovio kiel membroŝtato de la Eŭropa Unio, post riskokalkulo dum la printempo 2005 oni malŝaltis la unuan reaktoron. Laŭ la traktato pri la aliĝo de Litovio oni dum 2009 malŝaltu ankaŭ la duan reaktoron.

Origine planita kiel centralo kun kvar atomreaktoroj, Ignalina ne realiĝis kiel antaŭvidite. La unua bloko estis lanĉita la 31an de decembro 1983. La 31an de

aŭgusto 1987 ekfunkciis la dua bloko. Pro la katastrofo en nuklea centralo de Ĉernobil la konstruado de la jam je 60 % preta tria bloko estis ĉesigita.

## Vivo ŝanĝiĝos

Ŝevaldin diris, ke ekde la komenco de la jaro 2010 la situacio esence ŝanĝiĝos. „Ĝis nun ni mem gajnis monon, sed estonte ni devos ricevi ĝin por daŭrigi la laboron. Antaŭe ni produktis kaj vendis elektroenerĝion, kaj nun ni mem devos aĉeti ĉirkaŭ 170 megavathorojn. Ni liveris hejtenerĝion por Visaginas, kaj nun ni devos aĉeti 64 milionojn da kubikmetroj da gaso por produkti la bezonatan hejtenerĝion. Ni kalkulis, ke prizorgo de la mortinta elektrocentralo jare kostos ĉirkaŭ 100 milionojn da eŭroj. 80 % de la necesaj monrimedoj venos el internaciaj fondusoj kaj la cetero el la litovia buĝeto”.



*Malgraŭ ke la nuklea centralo ne plu produktas elektroenergien, la entrepreno kun 2000 laborantoj daŭre ekzistas.*



*Pro la katastrofo en nuklea centralo de Ĉernobil la konstruado de la jam je 60 % preta tria bloko estis ĉesigita.*




*La malfunkciigo de la nuklea centralo de Ignalina por la loĝantoj de Litovio kaŭzas altiĝon de la prezo de elektroenergio je preskaŭ 30 %.*

La direktoro konfesis, ke li precipe malĝojas pro la grandega kolonio de cignoj kaj aliaj birdoj, kiu kutimis pasigi vintrajn frostojn en la apuda lago Drukšiai. La akvo, kiu malvarmigadis la reaktorojn de la centralo, varmiĝinte elfluis en la lagon formante veran paradizon por la birdoj. Nun tiu paradizo finiĝis kaj post 25-jara paŭzo la lago denove glaciigis.

Malgraŭ ke la nuklea centralo ne plu produktas elektroenergien, la entrepreno kun 2000 laborantoj daŭre ekzistas. Dum la sekvaj dek jaroj estos sekure deponataj la radioaktivaj restaĵoj de la interna parto de la centralo. En la jaro 2020 ekos la malmuntado kaj dis-

vendado kiel metalrubo de radioaktive puraj instalaĵoj. Ankaŭ post tiu dato sur la areo de la iama centralo ne etendiĝos verdaj kampoj. Tie estos aranĝataj kaj dum multaj jardekoj prizorgataj deponejoj de poluitaj restaĵoj.

La malfunkciigo de la nuklea centralo de Ignalina por la loĝantoj de Litovio kaŭzas altiĝon de la prezo de elektroenergio je preskaŭ 30 %. La perdo de nuklea energio grave altigas la signifon de la centralo en Elektrenai, kiu ĉerpas energion el oleo kaj gaso. La mankantan parton de la energio Litovio nun importas el najbaraj landoj.



**Kontribuojn por la rubriko Ekonomio de Monato sendu al [ekonomio@monato.net](mailto:ekonomio@monato.net)**

LAST



# Nestokestoj

**M**ultaj finnoj faras nestokestojn por birdoj dum siaj lerneaj slojdolecionoj. Unue oni kurtimis konstrui kestojn por sturnoj kaj fiksi ilin sur apudhejma betultrunko. Tamen nun jam rariĝis la sturnoj kaj oni eksciis, ke multaj aliaj birdospecoj bezonas nestokestojn. Post la fino de lernejo iuj interesatoj daŭrigas la konstruadon de nestokestoj kiel hobion. Oni ne bezonas multajn laborilojn: necesas nur segilo, martelo, najloj kaj borilo por fari la enflugtruon. Kiel materialo taŭgas tabuloj. Oni povas uzi ankaŭ pecojn de ronda arbotrunko kun ŝelo.

Iompostiome oni lernas, kiajn kestojn diversaj birdospecoj akceptas kaj en kia medio ili prefere nestas: ĉu apud rapidflua rivereto en Laponio (cinklo), en sudurba parko (kolombo), proksime al kamparaj domoj (hirundoj, muŝkaptuloj), en densa picearo (diversaj paruoj), en foliarbaro (jingo) aŭ sur lagobordo (klangulo, merĝo). Ĉiu speco havas sian ŝatatan medion. La grandeco de la kesto kaj alloga enflugtruo varias. Se oni faras nestokeston por fenikuro, povas esti, ke ankaŭ kukolo demetas sian ovon en ĝi. Kelkaj specoj, ekzemple la nigra merlo kaj la blanka motacilo, bezonas nur tegmentitan tabuleton sur branĉo. La kestoj por strigoj kaj falkoj devas situi alte

(almenaŭ je 6 metroj de la surfaco), dum muŝkaptuloj preferas keston je 2,5 metroj, kaj tufmerĝoj (*Mergus serrator*) sur la tero mem.

## Kiaj kestoj?

Grava postulo estas, ke oni ne najlu la keston al la arbo, sed alfiksu ĝin per ŝnuro, kiu ne malhelpas la plidikiĝon de la trunko dum jaroj. Metala drato malhelpus, eĉ povus mortigi la arbon, kies vivosukoj ne fluus pro la rigida zono. La nestokeston oni povu malfermi kaj purigi vintre, kiam la loĝantoj forestas. Inter la restaĵoj de antaŭa nesto kaŝiĝas insektetoj danĝeraj por la sano de la sekvaj birdidoj. Krome, ne devus troviĝi loko por sciuro aŭ rabobirdo proksime al la enflugotruo, por ke la ovoj respektive birdidoj ne estu vorataj. La randon de la truo kovru metala ŝirmplato, tiel ke pegoj aŭ aliaj bekemuloj ne pligrandigu ĝin.

Antaŭ 60-100 jaroj oni povis profiti nestokeston, ekzemple de klangulo. Se iu printempe elprenis nur po unu ovon en tago, la birdo daŭre demetis novajn ovojn dum du-tri semajnoj. La kesto-konstruanto nutris sin per ili, ĉar dum la arkta vintro oni suferis pro manko de freŝaj manĝaĵoj.

Antaŭe oni faligis arbojn ne maŝine kaj grandkvante kiel nun. Do, birdoj

trovis kavetojn kaj truojn en malnovaj trunkoj, ekputriĝintaj, sur aŭ sub arbostumpoj, en fendoj, kaŭzitaj de fulmo. Tiaj lokoj nun mankas. Homoj, kiuj okupiĝas pri nestokestoj, portas kestojn al lokoj, kie ili supozas, ke birdoj serĉas ilin. Somere la kestokonstruanto kun granda intereso observas la vivon en kaj ĉirkaŭ la kestoj. Vintre li iras de kesto al kesto, riparante kaj purigante. Li kaj lia familio nutras la birdojn, kiuj restas proksime al lia domo dum la vintro. Estas ĝojige rigardadi, kio okazas en la korto aŭ ĝardeno kaj senti sin naturamiko. Homo helpas al birdoj, kaj birdoj helpas al li, kaptante en la ĝardeno somere malutilajn insektojn kaj raŭpojn. Tiu ĉi hobio facile plilarĝiĝas. Al ĝi aldoniĝas kreskanta intereso pri la naturo kaj ofte pri fotado.

Ne nur birdoj bezonas nestokestojn. Al erinacoj mankas taŭgaj lokoj por dormi dum la vintro kaj nesti printempe. Vespertoj serĉas malhelajn ripozejojn por la tago. Ankaŭ flugsciuro bezonas nestokeston, se ĝi ne trovas truon, faritan de pegoj. Se oni mem ne povas konstrui nestokestojn, oni povas aĉeti ilin rete ĉe [www.linnunpontto.com](http://www.linnunpontto.com) (finnlingva retejo kun bildoj pri kestoj kaj birdoj) aŭ donaci monon, por ke iu alia portu nestokestojn al taŭgaj lokoj.

SALIKO



RAITA PYHALA




RAITA PYHALA



STIJN PERMERT'S

# Bunkro remalkovrita



*Broŝuro pri la bunkro  
sub la Kimmel-monteto.*



**L**a belga urbeto Ieper [ipr], situanta en sud-okcidenta Flandrio, troviĝis dum la unua mondmilito en la batalkampo. Ĝi estis komplete detruita kaj post la milito rekonstruita. Nun ĝi estas turisma centro lige kun militaj memoraĵoj. Baldaŭ al ili aldoniĝos plia allogaĵo. Dekon da kilometroj for de Ieper, en la vilaĝo Kemmel (parto de la municipo Heuvelland), estas monteto, ĉirkaŭ kiu troviĝas kelkaj bunkroj kaj aliaj restaĵoj de la unua mondmilito. Tamen, sub la monteto ankaŭ estas apenaŭ konata bunkro, pli nova kaj multe pli granda.


## Malvarma milito

Post la dua mondmilito ekestis *malvarma milito* inter Usono kaj Sovetio, en kiu partoprenis ankaŭ iliaj aliancanoj. Dum tiu milito estis elspezitaj grandegaj sumoj por armado. Enkadre de tio en 1948 Francio, Britio, Belgio, Nederlando kaj Luksemburgo subskribis la Traktaton de Bruselo por kunordigi sian aerdefendon. Por loki unu el ties komandejoj, en 1953 estis fosita grandega truo sub la Kemmel-monteto. En ĝi oni konstruis trietaĝan bunkron sur areo de 2500 kvadrataj metroj.

La bunkro estis uzata nur dum mallonga tempo, ĉar kelkajn jarojn poste fondiĝis NATO. Ĉi-lastata kreis sian propran aerdefendan sistemon. En 1963 la belga armeo ekuzis la bunkron por instali sekuran komandejon, uzotan dum



*En la muzeo eblas vidi kiel funkciis la administracio en la 60aj jaroj.*



*Nomo de la muzeo en diversaj lingvoj.*



kiel plej avangardaj komunikiloj – kelkaj teleksoj por sendi kaj ricevi ĉifritajn mesaĝojn.

La malfermo de la muzeo jam kelkfoje estis prokrastita, sed antaŭ nelonge oni firme promesis, ke fine de 2009 oni oficiale anoncos ĝin sur la retpaĝo de militmuzeo.

**Roland ROTSAERT**

milito. Ĝi estis konektita al civilaj kaj militistaj komunikadsistemoj per la tiutempe plej modernaj ekipaĵoj disponeblaj. Kelkfoje jare en ĝi okazis ekzercoj. Post la fino de la malvarma milito en 1995 ĝi estis definitive forlasita.

### **Sekreto malkaŝita**

En la maldense loĝata regiono nur malmultaj homoj sciis pri la bunkro kaj post 1995 ĝi estis preskaŭ forgesita. En 2003 loka komitato sukcesis aranĝi vi-

ziton por manpleno da civiluloj. Dum kelkaj jaroj oni diskutis pri ebla reuzo de la komandejo. Finfine la respondeca ministro decidis, ke ĝi iĝu muzeo pri la malvarma milito, prizorgota de la belga militmuzeo (oficiala nomo: Reĝa Muzeo de la Armeo kaj Milita Historio, [www.klm-mra.be](http://www.klm-mra.be)).

En la muzeo eblos vidi kiel funkciis la administracio (ĉar la armea komandejo ja estas administracio) en la 60aj jaroj, sen komputiloj, nur kun skribmaŝinoj, telefonoj, grandegaj murmapoj kaj –



**Kontribuojn por  
la rubriko Turismo de  
Monato sendu al  
[turismo@monato.net](mailto:turismo@monato.net)**

# Senpaga transporto danke al loĝantarkonsciigo

**K**elkaj el niaj legantoj eble konas „Asterix”, francan bildstrio, kiu rakontas la reziston de gaŭla vilaĝeto kontraŭ la romia imperio. En Provenco, sudfranca kaj suna regiono, oni havas nek Obelix (heroon de la bildstrio) nek magian pocion por kontraŭstari, sed oni havas alian virton: espero kaj obstino kune preni sian sorton en siajn manojn.

## Vivigi Agendon 21

Ĉio naskiĝis el la pensado instali en *Pays d'Aubagne et de l'Etoile* (oriente de Marsejlo kaj proksime al Aix-en-Provence) Agendon 21, tiun mondan rezolu-

cion por daŭrigebla disvolvo kaj protektado de la medio. Necesis la volo de la urbestro kaj la insistado de la civitanoj por akceptigi tiun specifecon kaj batali kontraŭ la malkonsento de la instancoj. Malmultaj homoj en tiu triangulo trovas laborpostenojn surloke, kaj sekve ĉiuj devas vojaĝi al sia laborejo; krome la urbaro konsistas el disaj vilaĝetoj, kiuj proponis ne tro kostajn terenojn, kie estis konstruitaj multaj disaj vilaoj kun ĝardeno. Ideo por redukti poluadon kaj ŝpari energion estis instigi la homojn uzi la komunajn transportilojn kaj sekve proponi ilin senpage. Kiam la regiona prefekto (reprezentanto de la franca res-

publiko) rifuzis, ke la komunaj transportiloj iĝu senpagaj, la loĝantaro manifestaciis antaŭ la prefektejo, kaj delegitaro vojaĝis al Parizo, la ĉefurbo. Nova starto ekis la 15an de majo 2009.

## Senpagaj aŭtobusoj

Denove sur la urbodomaj frontonoj, flagrubando kun „Libereco, egaleco, senpageco” (kiu rilatas al la devizo de la franca respubliko „libereco, egaleco, frateco”). Ekde tiu tago la aŭtobusoj, kiuj kunligas la vilaĝetojn, etajn aŭ grandajn, kun la urboj, senpage akceptas pasaĝerojn, loĝantojn aŭ ne en la konkerna urbaro; tute egalas; neniu estas



En Provenco loĝantoj batalis por senpaga publika transporto kaj gajnis!



elĵetata.

Alia politika promeso estas rekonstrui senpoluan vojon por interligi la regionon. Fakte pli ol 70 000 veturiloj ĉiutage trairas tiujn vilaĝetojn, kunportas poluadon, eblajn akcidentojn, malŝparon de tempo kaj benzino, ĉar la

evoluo de la vilaĝoj, la interspaco inter la domoj kaj laborejoj, inferigas la vivon de la loĝantoj. Fervojo ekzistas, sed de longe ne plu estas uzata. Ĝia renovigo alportos sekurecon, rapidecon anstataŭ trafikŝtopiĝo, ŝparon de energio, plibonigon de la medio.



AMIR MOHAMMAD

## Plua batalo: traktado de forĵetaĵoj



ROEL



SESSI DE WROON

*La loĝantaro jam apartigas multon (vitro, papero, plasto, metalo), sed necesas recikligofabrika.*

Nia vivmaniero estigas malŝparadon de krudaj materialoj. Unue plastaj sakoj estis malpermesitaj. La municipo donacis al ĉiuj familioj du grandajn sakojn „daŭrigeblajn”. La loĝantaro jam apartigas multon (vitro, papero, plasto, metalo), sed necesas recikligofabrika. La elekto, proponita de la regionaj instancoj, estis cindrigo. Ĝi estis tuj rifuzita de la loĝantaro, kaj oni komencis studi la eblon de uzino por komposti kaj metanigi.

Ĉio tio estiĝis pro la kunagado de la uzantoj, lokaj administradestroj kaj politikistoj, kiuj kune cerbumis por provi respekti la Agendo-21-kontrakton. Ĉu apero de partoprendemokratio?

Janin RATUŠNIAK

**Kontribuojn por la rubriko  
Medio de Monato sendu al  
[medio@monato.net](mailto:medio@monato.net)**

# Tajg kaj Tomas



**B**ailenambeann estas kampara urbeto en meza Irlando. Ĝi ne estas aparte notinda krom pro apuda kastelo kaj arbarego, sed en la pasinteco ĝi estigis aŭ allogis al si kelkajn ekscentrulojn, pri kiuj oni ankoraŭ rakontas amuzajn aŭ bizarajn anekdotojn. Tiaj originaluloj ne plu abundas en nia hodiaŭa tute unuformiĝanta socio (kiel skribis Stefan Zweig), sed de temp' al tempo oni renkontas du aŭ tri rimarkindajn homojn, kiuj kontribuas al konservado de la reputacio de nia regiono kiel hejmo de originaluloj.

Nia unua renkontiĝo kun Tajg kaj Tomas okazis ĉe kunveno en Bailenambeann de la societo „Amikoj de Nikaragvo”, al kiu ni estis invititaj. En tiu vespero, la preleganto kaj prezentanto de filmo pri tiu mez-amerika lando estis Tajg. (Ekde tiu tago, Tajg iĝis ofta vizitanto en la domo de la kompilanto de ĉi tiuj analoj.) Oni konstatis, ke tiu tiam juna viro loĝas en malnova dometo en iom izolita parto de la ĉirkaŭaĵo. Li posedas malgrandan parcelon de tereno, sur kiu li kultivis legomojn kaj fruktojn sen uzado de kemiaĵoj. Li ne produktas sufiĉe por vendi, sed precipe danke al siaj modestaj rikoltoj, li sukcesas nutri sin. Kiel vegeterano, li tre ŝpareme vivas kaj postulas malmulton de la socio. Lia sola veturilo konsistas el malnova biciklo, per kiu li veturas nudpiede tra la tuta irlanda insulo. Dum tiaj vojaĝoj, li estas akompanata de sia hundo Broim („furzo” en la gaela). Broim estas iom malbela, sed fidela hundo, tre amata de sia mastro, malgraŭ la malĝentila nomo, kiun Tajg donis al ĝi ... Estas eksterordinare rigardi Tajgon rapide veturantan tra la kamparo, sekvatan de la hundo

kuranta sur la trotuaro aŭ ĉeflanke de la ŝoseo.

Tajg interesiĝas pri la popoloj de la tiel nomata Tria Mondo, precipe tiuj de la Ameriko Latina. Dum jaro li laboris kiel volontulo inter la malriĉuloj en Nikaragvo. Krom la irlanda (gaela) kaj la angla, li iom parolas la hispanan, lingvon, kiun li tre ŝatas. Lia ĉefa aktiveco, ekster la horoj kiam li laboras en sia parcelo, estas prezentado de filmoj pri Mez- kaj Sud-Ameriko, kaj organizado de festivaloj de kina arto en la hispana kaj la gaela. Li estas tre parolema kaj entuziasma pri ĉiuj el siaj intereso, parolante tiom rapide, ke kelkfoje oni devas tre atente kaj streĉe aŭskulti lin. Plie, lia akĉento estas de la korka (Cork-) regiono – ne la plej facile komprenebla por homoj, kiuj ne estas denaskaj irlandoj. Li neniam vestas sin mode aŭ elegante kaj plejofte aspektas kiel malriĉa vagabondo. Al amikoj kaj najbaroj li malavare donacas produktojn el sia eta ĝardeno. Li ofte diras, ke li intencas lerni Esperanton, sed mankas al li okazo por studi ĝin. Finfine, li estas bonkora, homarama viro, kun karakterizaĵoj, kiuj ne tute forestas eĉ en nia materiisma kaj egoisma epoko.

En tiu vespero, kiam Tajg parolis ĉe la kunveno de la Amikoj de Nikaragvo en Bailenambeann, ankaŭ ĉeestis Tomas de Paor, konato de Tajg. Tomas ne speciale interesiĝas pri Nikaragvo, sed li kaj Tajg dividas komunan intereson pri kinematografio, kvankam pro malsamaj kialoj. Tomas interesiĝas pri la optika tekniko, kiu estas lia profesio, kaj Tajg pri la filmoj mem. Plie, Tomas estis allogita de la hispana lingvo parolata en la prezentata filmo. Li estas amatora astronomo kaj ambicias iutage povi viziti, kaj eble uzi, almenaŭ unu el la grandaj observatorioj en Ĉilio, lando multe pli taŭga por astronomia observado ol la nuba irlanda insulo. Pro tio, li volas lerni la hispanan.

Ne tre malproksime de Bailenambeann situas la ĉarma urbeto Birr (gale:





## La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen,  
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00  
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: [retbutiko@retbutiko.net](mailto:retbutiko@retbutiko.net)  
skajpe fel-monato  
[www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net).

Biorra), iam nomita de la angloj, Parsonstown. Ĝis la dudeka jarcento Birr estis kvazaŭ posedaĵo de la grafoj Rosse, kaj malgraŭ la fakto, ke Irlando estas laŭkonstitucie respubliko sen nobelaro, la tiea kastelo kaj impona bieno ankoraŭ apartenas al la familio Rosse. Tiu familio estas fama pro la nombro da elstaraj amatoraj scienculoj kaj teknikuloj (kaj viraj kaj inaj), kiujn ĝi generis.

La aktuala grafo, lordo Brendan Rosse, daŭrigas la viglan intereson pri scienco de siaj antaŭuloj. Li establis sciencan centron sur la tereno de la bieno, disvolvis la belegan bienon kun ĝia vasta arboĝardeno kun multe da ekzotaj specioj (malfermita kontraŭpage al la publiko), kaj restaŭrigis la faman gigantan teleskopon. Tiu rimarkinda instrumento

estis konstruita en la kvardekkelkaj jaroj de la dek-naŭa jarcento, de la tria grafo Rosse. Ĝia grandega 6-futa (preskaŭ 2-metra) spegulo estis muldita en forno muntita en la kastela ĉirkaŭfosaĵo, kaj hejtita per torfo el la lokaj torfejoj.

La kolosa ligna barelo de la teleskopoj estis farita de urbaj bierbarelistoj, kaj estas tiom larĝa, ke iam novedzinoj, en siaj geedziĝaj vestaĵoj, estis fotitaj starante en la buŝo de la barelo. (La foton oni povas vidi en la scienca centro). La vasta potenco de la teleskopoj ebligis la trian grafon observi ege malproksimajn partojn de la universo. Li malkovris la *spiralajn nebulozon* (poste deklarita „galaksio”), nomita „La Kirlakvo” kaj tiel iĝis inicanto de la esplorado de la kosmaj profundaĵoj.



Iufoje, Tomas partoprenis astronomian festivalon, kiu ĉiujare okazas en Birr. En tiu jaro, post instalado de nova spegulo kaj okulario en la antikva teleskopon, la organizantoj de la festivalo intencis, ke la partoprenantoj povu fari iom da observado per la historia instrumento.

Bedaŭrinde, pro diversaj teknikaj problemoj, tio ne eblis, sed la vizito al la teleskopon inspiris Tomason dediĉi sin al profundkosma esplorado, anstataŭ banala observado de la luno kaj la sunsis-temaj planedoj.

Feliĉe, la festivalo donis al li la okazon kontakti posedanton de privata observatorio kun teleskopon eĉ pli potenca (kaj multe pli moderna) ol la Rosse-instrumento. Sekve, li kunlaboris kun aliaj astronomoj, kiuj per spektroskopio sukcesis malkovri ĝis tiam nekonatajn eksternsistemajn planedojn, kiuj, laŭ ili, teorie kapablus subteni la vivon. Per mezurado de la gravita influo de tiaj tiel nomataj *eksterplanedoj* sur la movo de

ties regantaj steloj, la teamo povis konstati la ekziston de nevideblaj planedoj. Poste, per observado de la variado de la ŝajna luminesko de sunoj, ili malkovris pli da tiaj planedoj dum ilia pasado antaŭ ties stelo. Ankaŭ, per modernaj teknikoj de spektroskopio, ili mezuris la atmosferon, graviton, ĉeeston de fero kaj aliaj elementoj, kaj de gasoj kiel metano kaj tiel plu.

Alian metodon, kiun li uzis estas la tiel nomata *mikrolensa* tekniko bazita sur la ĝenerala teorio pri relativeco de Einstein, laŭ kiu, kiam la lumon eliganta de iu stelo pasas tre proksime al alia stelo, survoje al la okulo de observanto sur la tero, la gravito de la intervenanta stelo iom kurbigas la lumradiojn de la origina stelo, kaŭzante ke la du steloj ŝajnas pli disigitaj ol normale.

Per tiuj konstatoj, Tomas konvinkis sin, ke la ekzisto de vivo sur multaj el tiaj planedoj estis ne nur ebla, sed verŝajna.

Li esperas, ke iutage, oni sukcesos

pruvi, ke inteligentaj estaĵoj ekzistas sur aliaj planedoj, kvankam li dubas, ĉu oni iam sukcesos kontakti ilin. Tiu hipotezo pri la ekzisto de vivo aliloke en la universo ne estas por li nura sciencfikcio.

La ambicio de lia amiko Tajg estas multe malpli pretendema, sed ne malpli grava. Li esperas ke, per sia prezentado de filmoj kaj prelegoj pri la Tria Mondo, li konvinkos la publikon pri la neceso helpi niajn malriĉajn homarajn gefratojn. Liaj iloj por tia kampanjo konsistas, ne el multekostaj instrumentoj kaj elspezo de vastaj fondusoj (kiujn li ne posedas), sed el lia biciklo, pruntitaj filmoj kaj projekciiloj, kaj la bonvolo de posedantoj de haloj en kiuj li povas fari siajn prezentadojn.

Por iu ajn estas privilegio konatiĝi kun homoj kiel Tajg kaj Tomas. La loĝantoj de Bailenambeann povas fieri pri la ekzisto en sia regiono de tiuj mal-similaj sed admirindaj viroj.

Albisturo KVINKE

Sen Rodin

## Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbadaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”

# ISBN: 90 77066 22 5  
# Pezo: 320 g  
# Prezo ĉe FEL: 24,00 €  
+ afanko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;  
[www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net), [retbutiko@retbutiko.net](mailto:retbutiko@retbutiko.net), aŭ ĉe via kutima librejo.



# Pri Pupteatra Internacia Festivalo

**E**n la jaro 2008 aperis en Zagrebo libro de Ivan Špoljarec *Pupoj vive*, lige kun la 40-jara jubileo de la Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). Ĉiuj tekstoj aperas en la kroata, angla kaj esperanta kaj estas verkitaj de pluraj aŭtoroj.

Mallongan historion pri la ekesto de PIF sekvas multaj fotoj de unuopaj pupoj, scenoj, pupludantoj. La diraĵo, ke bildoj diras multe pli ol vortoj, des pli validas, se temas pri historio pupteatra.

Estus interese, scii la enhavojn de teatraĵoj, kiaj „Kiam panjo ne estas hejme”, „Birdoj” aŭ „Blua, blanka kaj

nigra”. Aliaj havas konatajn temojn, ekzemple, „Princino sur la pizgrajno”.

La ĉapitroj „De jaro al jaro”, „Ekspozicio post ekspozicio” kaj „Premio post premio” mallonge priskribas ĉiun festivalon, ekspoziciojn kaj premiitojn; flanke de la tekstoj estas fotoj de organizantoj, teatraĵoj, publiko, ludantoj.

„Repertuaro” indikas, kiuj pupteatroj partoprenis en tiuj kvardek jaroj kaj kion ili ludis; sekvas „Flaviĝintaj paĝoj” kun tondaĵoj el ĵurnaloj kaj revuoj.

La tuto estas ne nur interesa sed

ankaŭ bela libro, kiun ne nur infanoj ŝatos trafolumi. Inda memoraĵo de tradicio, kiun iniciatis kaj daŭrigis entuziasma grupeto, kiu tra la jaroj aldonis novajn erojn.

Enestas kelkaj kompost-eraroj en la unuaj paĝoj, sed tio ne ĝenas la komprenon.

Anneke Buys

---

Ivan Špoljarec: *Pupoj vive*. Trilingva eldono (kroata, angla, Esperanto).

Eldonis IKS, Zagreb, 2008. 237 paĝoj binditaj. ISBN 978-953-6697-22-9.



Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.  
[www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net)  
[retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)  
 Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko

## La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

# Bilda enigmo

Jen enigmo ĉi-foje kun bildaj priskriboj (solvo povas esti ankaŭ radikvorto). La solvon vi trovos en la grizaj ĉeloj.

Sendu la solvon antaŭ la 1a de majo al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al [enigmoj@monato.net](mailto:enigmoj@monato.net).  
3 gajnantoj ricevos valoran libropremion!

|         |   |           |       |       |       |                    |   |       |          |
|---------|---|-----------|-------|-------|-------|--------------------|---|-------|----------|
|         |   |           |       |       |       | ?OP?               |   | JPVDD | <br>     |
| 4 +     | ▼ |           | ▼     | ▼     | ▼     | ▼                  | ▼ |       | ▼        |
|         |   | <br>O = E | ▶     |       |       |                    |   | ▼▼▼▼  |          |
|         |   | <br>+     | ▶     |       |       |                    | ▶ | ▼     |          |
| 4, 1, 8 | ▶ |           |       | ▶     |       | <br>- M<br>TO = TA | ▶ |       |          |
|         | ▶ |           |       |       | ▼▼▼▼▼ | <br>               | ▶ |       | MTR (-o) |
|         | ▶ |           | 8 + R | ▶     | ▼     | ▼                  |   |       | ▼        |
|         |   |           | 0     | ▼     |       |                    |   | ▶     |          |
|         | ▶ |           |       |       | ▼     |                    |   | ▶     |          |
| ?       | ▶ |           |       |       |       | <br>O = A          | ▶ |       |          |
|         |   |           | ▶     |       |       | ▼                  |   | d     | ▶        |
| Ω       | ▶ |           |       | <br>+ | ▶     |                    |   |       |          |

# Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj

Lidia Zamenhof

La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof, kompilita de Jean Amoureux, Zofia Banet-Fornalowa, Masayosi Higasida kaj Bernhard Westerhoff, kun antaŭparolo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

La vivon de Lidia Zamenhof, plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, stampis la du mond-militoj. La unuan ŝi travivis adoleske kaj dum la dua ŝi pereis koncentre. Ŝiaj en tiu ĉi volumo kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikan bildon de la periodo intermilita. Ili sumigas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi kaj mobilizi. Ŝi volis ilin savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.



Eldonjaro: 2009

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm,  
pezo 485 g, 430 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-38-6;  
prezo ĉe FEL 24 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 14,40 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo,  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

## anoncetoj

**Vizitu Ipernity**, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al [www.iper-nity.com/?lg=eo](http://www.iper-nity.com/?lg=eo) Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF** kune kun Monato! Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo", kaj kun prelego pri la 30-jara ekzisto de Monato. Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de).

**"Naturista Vivo"**, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com).

**Esperanto-instruistoj:** vizitu [www.edukado.net](http://www.edukado.net). Ĉio de vi por vi!

**Kreu vian propran librokatalogon!** Per la Retbutiko [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net)!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro\* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj\*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al [http://www.esperanto.be/fel/mon/mon\\_anon.php](http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php).

\*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

# Komencanto

## "Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998  
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)  
provizora retpaĝo:  
[www.Komencanto.narod.ru](http://www.Komencanto.narod.ru)

Poŝta adreso:  
KOMENCANTO,  
pk 132, Ekaterinburg,  
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj  
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.  
Abonu ĉe UEA aŭ  
ĉe via landa peranto

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

# LA GAZETO

MONDKULTURA  
SENDEPENDA  
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO  
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

[lagazeto@osiek.org](mailto:lagazeto@osiek.org)

<http://www.lagazeto.com>

# La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista  
4 numeroj jare + La Krom

[ikk@free.fr](mailto:ikk@free.fr)

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc  
Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long,  
Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn,  
Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu,  
Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij  
Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri,  
Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)  
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris  
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



# LA GRAFO DE MONTE- KRISTO

**La vivoverko de Alexandre Dumas  
kaj**

**la vivoverko de tradukisto Daniel Moirand  
baldaŭ aperos!**

Oni kutimas konsideri la libron *La Grafo de Monte-Kristo* kiel la ĉefverkon de A. Dumas. Ĝi estas vere fascina. Ĉiu plia (re)legado ebligas trovi ion novan, novan interpretadon, novan aspekton ...

La ĉefrolanto, Edmond Dantès, perfidita pro kalumnia denunco, estas enkarcerigita dum dek kvar jaroj en la malliberejo de la kastelo If, sur insuleto apud Marsejlo. Tie li konatiĝas kaj amikiĝas kun sammalliberejano, abato Faria, kiu transdonas al li la sekreton pri la loko de kaŝita trezoro. Post lia forfuĝo el la malliberejo kaj rekupero de la trezoro, la strebo de lia tuta vivo, danke al supera riĉeco kaj inteligenteco, estas venĝi sin kontraŭ tiuj, kiuj atencis lian juncon, lian feliĉon.

**A. DUMAS**



**LA GRAFO DE  
MONTE-  
KRISTO**

FEL

La klasika bindita versio enhavos 1184 paĝojn kaj konsistos el 2 binditaj volumoj. Ĝia prezo estos 96 eŭroj + afranko. Kiu mendas kaj pagas la du volumojn al FEL **antaŭ la 1a de majo 2010** pagu nur 64 eŭrojn inkluzive la kostojn de registrita alsendo. Krome la verko estos ricevebla kiel e-libro en la formoj ePub, Mobi kaj PDF kontraŭ 32 eŭroj.